# Esperanto en Danio

16-a jarkolekto • n-ro 4 • septembro 2009



Bella Center, Kopenhago: UK-ejo de 2011

## Esperanto en Danio
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Regin Larsen
Ole Terkelsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 32 50 50 88 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.11.2009**

# Enhavo

**Vi trovos ..................................3**
**Somera Studado en Slovakio..4**
**Roskilde-e-e-e!..........................6**
**Elsinoro-o-o-o!..........................8**
**La feliĉa esperantistiĝo.........10**
**Mallonge.................................11**
**Paperaj gazeteltondaĵoj.........12**
**Næstved.................................13**
**Kopenhago.............................14**

# Vi trovos ...



... ke kun ĉi tiu numero venas ekstra numero nur pri Ivo Lapenna, kiu ĉi-jare naskiĝis antaŭ 100 jaroj. En la historio de Esperanto li estas la dua post Zamenhof mem, kiu kiel konate ankaŭ ĉi-jare havas jubileon, nome la 150-jaran, digne festitan en Bjalistoko ĉi-somere. Lapenna estis tre konata kiel oratoro, kaj pluraj el liaj paroladoj estis filmitaj kaj estas nun publikigitaj en la retejo de Youtube. Li ankaŭ estos la temo de la malferma tago de UEA en Roterdamo la 28-an de novembro.

La lastan tagon de la UK en Bjalistoko la estraro de UEA anoncis la decidon ke la UK de 2011 okazos en Kopenhago! Malantaŭ tiu decido staras la fakto ke la kopenhaga turista agentejo *Wonderful Copenhagen* antaŭ kelkaj monatoj petis nin inviti la kongreson. Post esplorado pri taŭgaj kondiĉoj fare de la direktoro Osmo Buller, kiu vizitis Kopenhagon en junio, oni finfine faris la decidon.

Nun estas nia vico eklabori, kaj la DEA-estraro jam organizis provizoran LKK (Loka Kongresa Komitato), kiu unuafoje kunsidis tuj post UK. Multaj taskoj estas farendaj dum la venontaj du jaroj, sed la ĉefa decido pri la kongresejo estas jam farita: la kongresejo estos la Bella-Centro, kie ni povos disvolvi ĉiujn aranĝojn. La loĝigaj kondiĉoj estas ankaŭ tre favoraj, ĉar oni finkonstruas plurajn grandajn hoteloj apud la kongresejo. Precipe taŭga estas la nove konstruita hotelo Cabinn Metro, la plej granda, impona kaj malmultekosta dana hotelo kun 710 ĉambroj, desegnita de la fama arkitekto Daniel Libeskind. Du aliaj pli multekostaj eblecoj estos la kvar-stelaj hoteloj: tiu de la Bella-Centro mem kaj Copenhagen Towers. Por atingi la urbocentron oni nur bezonas dekminutan vojaĝon per la metroo.

Post tiuj du gravaj taskoj tamen restas multaj aliaj por ke la kongreso sukcesu. Precipe dum la kongresa semajno ni bezonos helpon de multaj esperantistoj kiel ĉiceronoj aŭ giĉetaj servantoj. Mi esperas ke la plejmulto de niaj membroj volos helpi disvolvi sukcese la kongreson, kaj oni povas jam nun anonci sin al la prezidanto aŭ iu ajn LKK-ano. Ne gravas se la fortoj sufiĉas nur por kelkhora deĵorado, gravas ke ni ĉiuj partoprenu en tiu defio.

*Ileana Schrøder*

# Somera Studado en Slovakio

Somera Esperanto-Studado estas ideo kreita de la teamo de la populara retpaĝo lernu.net. Ili invitis uzantojn, kiuj volas aŭ lerni Esperanton aŭ plibonigi sian nivelon, al unusemajna studado en Slovakio proksime al la ĉefurbo, Bratislavo. El Danio partoprenis kvar homoj, Ib, Jonas, Rasmus kaj Regin, kiuj veturis tien kune en la aŭto de Ib, parte per aŭtotrajno de Berlino ĝis Vieno. La partoprenon de Jonas kaj Regin finance subtenis kune DEA kaj DEJO, tiel ke ili povus plibonigi sian instrukapablon.

Dum la semajno okazis ĉiutage de la 9a horo ĝis la 13a instruado je kvar diversaj niveloj: komencanta, komencinta, progresanta kaj perfektiga. Poste dum la posttagmezoj kaj vesperoj okazis ekskursoj (interalie al Vieno kaj Bratislavo) kaj distraj programeroj. Entute partoprenis ĉirkaŭ 70 homoj kun diversaj aĝoj kaj el plej diversaj landoj (Eŭropaj landoj, Usono, Rusio, Irano, ...). Efektive la aranĝo estis sukcesa: la komencantoj eklernis Esperanton kaj povis tuj praktiki ĝin kun pli spertaj parolantoj, kaj la spertuloj povus enprofundiĝi en ”seriozaj" temoj kiel ekonomio aŭ saneco. La komencantoj multe profitis de sia praktikado inter si, kaj per la parolado kun la pli spertaj parolantoj.

Tre bona afero pri la aranĝo estis la ideo pri la “anĝeloj”. Anĝeloj estis pli spertaj volontulemaj partoprenantoj, kiu ricevis alikoloran nomŝildon, kaj helpis kaj ekbabilis kun komencantoj, kiuj bezonis helpon lerni la lingvon kaj ĝenerale kompreni kio okazas dum la aranĝo. Tiel komencantoj bone enkondukiĝis en la etoson kaj la lingvon.



*La anĝeloj dum SES 2009*

La loĝejo estis sufiĉe bona kaj kun bela panoramo el la senfinaj altanokoridoroj kiuj ĉirkaŭis la tutan domegon. La loĝejo mem troviĝis en vilaĝeto kun la nomo Harmoniá, kiu situis ĉirkaŭ 5 kilometrojn for de de malgranda urbo, Modra. Kvankam malgranda en tiu urbo troviĝis sanvendejo (kio multe ĝojigis Jonas).

Krome en la urbo estis kelkaj Zmrzlina-ejoj. Kio estas tio? Nu, en la slovaka lingvo “Zmrzlina” signifas glaciaĵon – kaj ili estis ege bonaj kaj eĉ malmultekostaj, do tre popularaj inter preskaŭ ĉiuj partoprenantoj.

*Jonas Dalmose kaj Regin Larsen*

Jen kanto kiun verkis Jonas kun la germano Johannes Müller dum SES, ĝi bone priskribas la etoson tie:

**SES-kanto 2009**

Ho mi tiome lacas
kaj la kapo doloras
pro la dumtutataga studado tie ĉi.
La vetero tro varmas
kaj preskaŭ mi larmas
kaj plej verŝajne estas same kiel vi,

*Rekantaĵo:*
Sed tamen ĝojas ni esti ĉi tie
por lerni diversaĵojn pri lingvoj kaj la mond'
Foje diskutas pri mondopolitiko kaj
ĝia signifo por nia estont'

Ĉar la ejo tro grandas
homoj ofte perdiĝas
en la koridoraro de la multangula dom'
Ĉar la vojoj ege longas
ni ofte forgesas
dum la voj' en kiu ĉambro okazas la studad'

La manĝaĵo 'stas bona
senfrukta senlegoma
sed multe da blankaj farunaĵoj manĝas ni
La trinkaĵoj tro dolĉas
kaj kolore ne plaĉas
Prefere nur akvon de la krano trinku vi

Ni tre volas danki
al la organizantoj
por la senlaciĝema laboro de vi.
Venontjare vi refaru
kaj denove invitu
komencantojn kaj lingvospertulojn tien ĉi.

Lasta rekantaĵo 2-foje:
Ĉar ege ĝojis ni esti ĉi tie
kaj kune vojaĝi al la sekva renkontiĝ'
Liberec' nin alvokas kaj volonte ni sekvas
Per komuna vojaĝo esperable sen stopiĝ'

*Teksto: Jonas Dalmose kaj Johannes Möller*
*Melodio: Suoma popolmelodio ”Valso de Emma”*

## Roskilde-e-e-e!

Denove ĉi-jare la dana esperantista junulara organizo (DEJO) kunlabore kun FESTOKLUBO aranĝis laborfeston ĉe la grandega rokmuziko-festivalo en la mezgranda urbo Roskilde proksime de Kopenhago.

Ĉi-jare jam la trian jaron partoprenis laborantaj esperantistoj, kaj ĉiujare la nombro de esperantistoj kreskis.

DEJO plenumas laboron por la festivalo, kiu rekompence donas al ĉiuj laborantoj enirbileton al la kvartaga festivalo. DEJO ankaŭ gajnas iom da mono pro la respondeco kaj uzas iom de ili por prizorgi la laborantojn per taŭga dormejo, manĝaĵo ktp., kaj alia parto de la mono estas uzata por subteni esperantajn aranĝojn dum la venonta jaro.

Komence DEJO deĵoris en garantiaĵ-redona budo kiu postulas 35 laborantojn. Sed ĉi-jare DEJO ankaŭ ekhavis respondecon pri pordego. Tie la laboro konsistas el kontrolado ke la festivaluloj portas sian brakbileton kaj ne kunportas malpermesitajn aĵojn. Tiu laboro postulas 33 laborantojn

kaj tiel la nombro de laborantoj kreskis je 68, el ili 50 estis esperantistoj el ĉie (krom Eŭropo venis esperantistoj de Japanio, Rusio, Brazilo, Ukrainio). Sed ankaŭ la ne-esperanta parto estis internaci-konsista kun homoj el Usono, Pakistano kaj Aŭstralio.

La ĉeforganizantoj celas ke la laborfesto daŭre kresku ĝis ĉ. 200 laborantoj dum la venontaj du-tri jaroj. Kvankam la muzikprogramo daŭras nur kvar tagojn, la tendejo ĉiam estas plenplena de festemuloj tri tagojn antaŭe. La tuta tempo ĉe la festivalo tial estas almenaŭ unu semajno, plus por multaj, antaŭpreparo kaj postfesto en Kopenhago, loĝante ĉe la lokaj esperantistoj. Menciindas ankaŭ KEF tuj post la festivalo.

La postulita labortempo por gajni la bileton estas entute 24 horoj. Tial restas multe da tempo fari ion ajn kiel festi kun aliaj festemuloj, iri al koncertoj, resti en nia manĝripozejo, ekskursi al la proksima malnova vikinga urbo Roskilde, aŭ simple kolekti skatolojn por gajni poŝmonon. Fakte kelkaj forirante havis multe pli da mono ol alveninte.

Por ke ĉio bone funkciu kaj por certigi kiel eble plej bonan etoson gravas ke ĉiuj partoprenantoj partoprenu en la komuna laboro kiel ekzemple konstrui nian tendaron, butikumi, kuiradi, lavadi, purigadi ktp. Sed kiel granda laŭdo al la partoprenantoj ni denove ĉi-jare observis ke la homoj estas tre helpemaj kaj ke ĉiuj taskoj ĉiam facile estas plenumitaj kaj ke tio estas parto de la socia festo.

Malkiel multaj aliaj Esperanto-kunvenoj ni festas/laboras inter aliaj ne-esperantistoj kiuj kompreneble ofte defias nian uzadon de la internacia lingvo, kaj oni devas preti ĉiam ŝanĝi inter Esperanto kaj ekzemple la angla, sed tamen nia laborlingvo plej ofte restas en Esperanto aŭ ambaŭ.

La Roskilde-renkontiĝo certe estas unika kompare al aliaj Esperanto-renkontiĝoj. Oni devas esti preta travivi primitivan tendumadon, ĉiajn veterojn, amasojn da ebriaj homoj, senĉesan bruon, ks. Sed la respondo, kiun ni ricevis de la partoprenantoj plejparte estis tre pozitiva. La tuta festivalo certe estas unika kaj fama pro la amika etoso, la bona muziko kaj la preskaŭ ĉiam bona vetero.

*Thorbjørn “Fulmo” Køie, ano de FESTOKLUBO kaj estrarano de DEJO.*

# Elsinoro-o-o-o!

Por la 9a fojo okazis Kultura Esperanto Festivalo (KEF), ĉi-foje en du landoj kaj urboj nome Elsinoro kaj Helsingborg. KEF originas kiel ideo de Per Aarne Fritzon, kiam li estis ano de la junulara stokholma grupo ”La Ranetoj”. La baza ideo estis ke ni ne atendu la finan venkon sed jam nun ĝuu nian kulturon, kaj tial en majo 1986 okazis la unua KEF, kiu prezentis originalan Esperanto-kulturon. Muziko, teatro, literaturo, filmoj, danco, ludoj ktp.

Unu kriterio kaj postulo de KEF al la artistoj, pli grava ol ke la prezentaĵoj estu originalaj, estas ke ili estu altkvalitnivelaj. Tiu postulo venis aŭtomate, kiam ni malfermis la pordon al la ekstera mondo kaj volis prezenti KEF kiel ajnan kulturan aranĝon en Danio/ la mondo. Fakte ne estas agrabla tasko juĝadi kio estas bona kaj kio ne, sed ni sentas iun respondecon rilate al la publiko kaj al la Esperanta kulturo. Ne estas tiel, ke ĉiuj, kiuj ne estis prezentitaj dum KEF, estas malaltkvalitaj. Ofte temas pri grupoj, kiujn ni ŝatus havi sed pro financaj kialoj ne povas inviti. Estas ankaŭ aferoj, kiuj – laŭ nia opnio – ne estas sufiĉe bonaj por prezenti al la cetera mondo.

Ni havis kvar sukces-kriteriojn, el kiuj la 3 unuaj tre bone plenumiĝis:

- ke estu bona programo kaj ejoj
- ke la artistoj kaj partoprenantoj sentu sin bone
- aperi en la diversaj amaskomunikiloj
- ke venu multaj neesperantoparolantoj

Do la defio por venontaj KEFoj estas, kiel oni sukcesos prezenti nian kulturon al la ekstera mondo.

Alia afero kiu estas specifa por KEF estas ĝia organiza teamo. En Esperantio ja kutime iu estraro aŭ alia elektita grupo organizas la aranĝojn. Sed precipe ĉi-jare estis grave por la teamo ke la homoj, kiuj eniris ĝin, komplementigu unu la aliajn per siaj diversaj povoj. La teamo estis Line Burholt Kristesen, Jacob Nordfalk, Gosia Nitkowska, Jytte Sunekær kaj Kim J: henriksen.

Vi certe aŭdis pri la granda nombro de artistoj kiuj sin prezentis dum KEF. Ni eĉ bedaŭrinde povas fanfaroni ke estis pli da artistoj ol en la 15-oble pli granda UK. Ni nur deziras mencii kelkajn aferojn, kiuj do estas tre specialaj por KEF. Ni tre fieras ke ni sukcesis starigi la unuan internacian

infanrokbandon kiu kantas en Esperanto, nome la Rokidoj. Tri el la infanoj fakte estas idoj de famaj Esperantaj rokmuzikistoj – do nova rokgeneracio. Ni ĝojas pri la proza kaj poezia metiejoj, kie oni povis lerni pri nia kulturo kaj mem lerni verki en Esperanto. Unikas la artistaj prezentoj kie du diversaj artistoj aŭ grupoj sin prezentis kune, kie estis tempo por eniri pli densajn diskutojn kaj por ke la artistoj surloke prezentu ion kune. Memorindaj momentoj. Ni ricevis multajn pozitivajn reagojn al ekzemple la granda komuna drumorkestro, kiu post du-hora ekzercado prezentis sin en la urba placo. Entute KEF 9 estis aktiviga, intensa, varia en la kulturartoj kaj muzikstiloj, dulanda festivalo, brila loko por la artistoj ekkuni kaj intermiksi sin.



*"La Rokidoj"*

Dankon al la partoprenantoj, artistoj, monapogantoj, helpantoj, kunlaborantoj, kuiristoj kaj la Esperanto kulturo!

Nun la KEF teamo pripensas kiam kaj kiel okazu la venonta KEF. Ĉu post Roskilde Festivalo? Ĉu en Islando? Ĉu aranĝi orienteŭropan KEF venontjare por tiuj kiuj ne havas monon por iri al Kubo? Ĉu tuj antaŭ la Universala Kongreso en 2011? Ĉu kiel paralela aranĝo dum UK 2011 (kaj tiel plibonigi la kulturan programon de UK)? Aŭ ĉu nun la norvegoj transprenu la taskon?

Vidu fotojn, artikolojn kaj aliajn memoraĵojn en la interreto ĉe kef.saluton.dk/memorajoj.

*Kim J. Henriksen*

Recenzo

# La feliĉa esperantistiĝo

Iun tagon iu ekkaptas la ideon lerni Esperanton. Diligente la komencanto studadas la komencantan kurson kaj poste studadas la libron Gerda Malaperis. La diligentulo nun sufiĉe bone legas facilajn tekstojn, povas skribi mallongajn leterojn kaj povas buŝe demandi kaj respondi demandojn. Tamen iom post iom venas al li/ŝi en la kapon peturban ideon, ke la uzado de la lingvo estas nur la pinto de la glacio-monto. Dum ĉeesto kune kun spertaj esperantistoj la novulo aŭdas novajn, strangajn vortojn: UEA, UK, SAT, satano, finvenkisto, raŭmisto, fervojisto, la interna ideo, PIV, Akademio, Monato, Pasporta Servo kaj multaj aliaj k.t.p.-oj. “Ho ve, savu min!” pensas la kompatinda novulo. “Mi volis lerni lingvon ne eniri ian strangan mondon!”

Simpatie komprenante la malfacilaĵojn de novaj esperantistoj, Bent Jensenius verkis la legindan libron “Bonvenon en nia mondo”. Laŭ la opinio de la aŭtoro eĉ komencantoj senprobleme povas legi ĝin, pro la facila lingvaĵo.

En la antaŭparolo de la libro Bent skribas: “Esperanto! – Ĉu ĝi ne estas morta lingvo!? En kiu angulo de la mondo oni povas uzi ĝin?”

En la sekvantaj 27 ĉapitroj la aŭtoro respondas la demandon. Gvidante la leganton de loko al loko en Esperantujo Bent donas al li/ŝi multajn informojn pri la aktuala Esperanto movado kaj ties eblecoj por nuntempaj esperantistoj. Interalie troviĝas faktoj pri UEA, la Universala Kongreso, la Akadamio, la jarlibro, kluboj, Esperanto-muzeoj, Pasporta Servo, Bona Espero, Kastelo Grezijono, ekoturismaj renkontiĝoj, internaciaj fervojistaj ski-semajnoj, Verda Domo de Arizono, Vikipedio, Lernu-net, korespondado kaj babilejoj ktp.

Ĉiu ĉapitro konsistas el tri partoj: facila teksto, dialogo pri la temo de la teksto kaj demandaro. Plue en la lasta parto de la libro troviĝas proponoj por rolludoj. La tekstoj enhavante taŭgan vorttrezoron ebligas al novuloj priparoli pri aktualaj Esperantaj aferoj. La informoj donas al ili la eblecon elekti agadojn kaj distraĵojn en Esperantujo.

Ĝis nun la plej ofte studata libro por progresantoj jam estas “Vojaĝo en Esperanto-lando”. “Bonvenon en nia mondo” ne estas anstataŭaĵo por la detale informita, defia kaj bonega libro de Boris Kolker. Tamen laŭ mia opinio antaŭ ol progresanto ekstudas la libron “Vojaĝo en Esperanto-lando” indus unue pripensi la studadon de “Bonvenon en nia Mondo”.

La libro ‘Bonvenon en nia mondo’, eldonejo Kava-Pech. ISBN : 978-80-87169-11-7 aĉeteblas ĉe la kutimaj libroservoj. En Danio kostas proksimume 85 kronojn.

*Betty Chatterjee*

# Mallonge

La 94-an Universalan Kongreson en Bjalistoko inter la 25-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto partoprenis 1860 personoj el 61 landoj, el kiuj 20 estis danoj. La urbo forte subtenis la kongreson, okaze de la 150-jariĝo de L.L. Zamenhof, kaj ĉie estis Esperantaj flagoj kaj koncertoj en placoj kaj parkoj. Samtempe okazis en la proksima urbeto Supraśl la 40a Internacia Infana Kongreseto kun 37 infanoj el 17 landoj, grandparte denaskaj esperantistoj.

Ankaŭ la 65-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis inter la 18-a kaj la 25-a de julio 2009 en la ĉeĥa urbo Liberec, estis alekstere sufiĉe sukcesa. La germana tutlanda televido ARD elsendis triminutan raporton pri ĝi tute *en* Esperanto kun germanaj subtekstoj.

La 95-a Universala Kongreso en 2010 okazos en Havano, Kubo. La prezidanto de la Granma-filio de Kuba Esperanto-Asocio proponas leteran amikiĝon antaŭ ol iri tien. La adreso estas: Rafael Cabrera Espinosa, Granma Esperanto-Filio, PK 48 Bayamo 1, 85100 Granma, Kubo (rete esperanto@crisol.cult.cu).

# Paperaj gazeteltondaĵoj

*Novembro 2008*

Prelego de Ileana Schrøder menciita dufoje en Næstved-medioj
Jernbanefritid: La trafikisto kaj Nyt fra Esperantoforeningen
Ugebladet Næstved: Asocia registro

*Decembro 2008*

Krucvortenigmo en Hjemmet
Kristnaska mesaĝo de la Papo
Radioprogramo de Radio Vatikano

*Januaro 2009*

Prelego de Anna kaj Erik Hansen menciita kvinfoje en Næstved-medioj kaj Berlingske Tidende
Jernbanefritid: INNOTRANS kaj KAEST 2008

*Februaro 2009*

Prelego de Lene kaj Jan Niemann menciita kvinfoje en Næstved-medioj kaj Berlingske Tidende
Ugebladet Næstved: Asocia registro
Jernbanefritid: DEFA Internationalt

*Marto 2009*

Prelego de Peter Weide menciita trifoje en Næstved-medioj
Jydske Vestkysten: Enigmo ’Fup&Fakta’

*Aprilo 2009*

Jernbanefritid: Forårets og sommerens arrangementer
Valby-Bladet: Esperanto-ordbog til frit brug

*Majo 2009*

Radioprogramo de Radio Vatikano
Ugebladet Næstved: Asocia registro

*Junio 2009*

Jernbanefritid: Nyt fra DEFA-esperantoklubben
Sjællandske: Intervjuo kun Lars Pilegaard, Sorø
Lokalavisen Nordsjælland: Esperantofestival også i Helsingør

*Julio 2009*
Forsikringsfunktionæren: Krucvortenigmo
Jernbanefritid: DEFA-nyt kaj Fervojo
Helsingør Dagblad: Esperanto-folket indtager Helsingør
Helsingør Dagblad: Tag til festival og lær et nyt sprog
Lokalavisen Nordsjælland: Kultura Esperanto-Festivalo i Helsingør
Skåne Sverige: Esperanto – språket utan gränser

*Aŭgusto 2009*
Ugebladet Næstved: Asocia registro

Krome, TV2 Lorry sendis kelkminutan programeron pri KEF 9 en Helsingør. – Esperanto estas menciita en libro de Erik Pouplier: Bryllupsrejsen.

Daŭre memoru sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

# Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk - Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111 (krom la du prelegoj 02.10. kaj 06.11. kiuj okazos en 219).

***Okazos***

Ve 18.09 je h 19.00: DEFA-kunveno pri la IFEF-kongreso en Triesto
Ve 02.10 je h 19.30: Danlingva prelego pri vojaĝo en Antarktio
Ve 16.10 je h 19.30: Kunveno kun pritrakto de Faktoj kaj Fantazioj
Ve 23.10 je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo
Ve 30.10 je h 14.00: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj
Ve 06.11 je h 19.30: Danlingva prelego pri vojaĝo al Aŭstralio kaj ĉirkaŭaĵo
Ve 13.11 je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo
Ve 20.11 je h 14.00: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj
Ve 04.12 je h 19.30: Danlingva prelego pri genealogio
Ve 11.12 je h 13.00: Jul-aranĝo (lunĉo kaj ujutno)

*Okazis*

Somera ekskurso la 1-an de aŭgusto (prokraskita pro diversaj kaŭzoj) al la preĝejo de Kongsted kaj la kalkminejo de Fakse kun tiea nova kaj interesa muzeo, kaj posta kaftrinkado ĉe Bente kaj Lars. Brila somera vetero kaj ujutna travivaĵo.

## Kopenhago

Aŭtuna programo 07.09. – 14.12. 2009 de **Konversacia Esperanto-Klubo**. Kunvenoj okazas ĉiun lundon ekde la 19:30 en Tomsgårdsvej 35.

07.09: Bent Jensenius rakontos pri sia vizito al Madrido.
14.09: Kantvespero kaj Birgit Andersen prezentos sian fotaron de Bjalistoko.
21.09: Birgit Andersen prezentos orepokan bildon.

**Vendredon 25.09:** DEA celebros la Tagon de Lingvoj kaj la Zamenhofan jubileon kunlabore kun la Pola Ambasado.
Estas nur duhora aranĝo, do invitilojn ricvos nur kopenhaganoj kaj Næstved-anoj. Se vi loĝas ekster Selando, kaj ŝatus partopreni, bonvolu turni vin al la prezidantino de DEA (adreso sur p. 2).

28.09: Studgrupo. Faktoj kaj Fantazioj. Faktoj iĝas fantazioj, Fantazioj iĝas faktoj. Gvidanto Bent Wiinberg.

05.10: Egon Starup Jensen prelegos pri la temo: 'Charles Darwin kaj lia signifo por la dana literatur-historia trapaso.'
12.10: Traduka vespero.
19.10: Ni rakontu pri iu ajn aĵo.
26.10: Studgrupo.

02.11: Ĉu vi kongresos en Kubo la venontan jaron?
09.11: Traduka vespero.
16.11: Ne jam decidita.
23.11: Studgrupo.
30.11: Birthe Lapenna prelegos pri la vivo kaj la agado de Ivo Lapenna.

07.12 : Aŭkcio. I.a. Arne havas heredaĵon da libroj el la Esperanto-klubo de Vejle , kiujn oni povos aĉeti. Ankaŭ liaj aĵoj estos vendataj. Venu aĉeti kristnaskajn donacaĵojn, ĉu ne?
14.12 : Kristnaska kaj libro-taga festo.

**La Esperanto-Kulturgrupo** kunvenas unufoje monate en la kunvenĉambroj super la biblioteko de Danasvej 30B, 2000 Frederiksberg. Oni malfermas la pordojn je la 19-a horo kaj komencas la programon je 19:30.

**Ĵaŭdon, 08.10. 2009: LA UNUA... Kion vi scias pri la Internacia Lingvo, ĝia kulturo, ĝia movado ...?? Parto II.**

Mogens Rude Andersen kunmetis malgrandan prihistorian kvizon en formo de 19 demandoj, kiuj ĉiuj komenciĝas jene:
"Kion vi povas rakonti pri la unua ...?".
Ĉi tiu dua parto enhavas entute 9 demandojn; ili pritraktas plejparte aferojn danajn. Same kiel en aprilo 2009 ni grupete interparolos kaj metos la demandojn en fokuson; ni provos trovi komunajn solvojn. Poste Mogens Rude prezentos al ni la ĝustajn respondojn kaj ilin spicos per multaj interesaĵoj.

Venu kaj ĝuu informriĉan vesperon en la Esperanto-Kulturgrupo. Prezo: 10 kr. Kafo: 10 kr.

**Vendredon, 06.11. 2009: Granda kaj varia jubilea vespero okaze de la 100-jara naskiĝdatreveno de Prof. Dr-o Ivo Lapenna.**

Detala programo aperos komence de oktobro. Prezo por partopreno 30 kr. Aliĝo estos necesa; ĝi okazu plej malfrue 01.11 al: Torben Svendsen, rete kulturgrupo@webspeed.dk.

**Sabaton, 12.12. 2009: Zamenhof Festvespero**

Granda jubilea festvespero okaze de la 150-jara naskiĝdatreveno de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.
Detala programo aperos. Prezo por partopreno: 70 kr. (inkluzive manĝaĵon). Aliĝo estos necesa; ĝi okazu plej malfrue dim. 06.12.2009 al: Torben Svendsen: Tel: 3874 9764, rete: kulturgrupo@webspeed.dk.

# Bjalistokaj bildoj



*Rigardo super Bjalistoko*



*La Zamenhof-centro en Warszawska-strato*



*La urbestro akceptas kongresanojn – en bona Esperanto! – en palaco Branicki*



*Ekspozicio en la Zamenhof-centro*



*Improvizita tamburad-prezento*



*La enirejo de la Zamenhof-centro*